☛ L'adhésion à JEFO s'étend sur l'année scolaire allant du 1/10/94 au 30/9/95. Les membres de JEFO reçoivent les revues *JeunEsperanto Info* (française) et *Koncize* (européenne), bénéficient de tarifs privilégiés dans notre catalogue, et ont accès gratuitement aux cours organisés par JEFO. Les membres de moins de 30 ans ont le droit de vote pour le conseil d'administration de JEFO. Si vous adhérez à JEFO en cours d'année, merci de nous indiquer les numéros de *JeunEsperanto Info* et *Koncize* que vous n'avez pas reçus. Nous vous les ferons parvenir dans la limite des stocks disponibles.

☛ L'adhésion à TEJO s'étend du 1/1/95 au 31/12/95. Les membres de TEJO sont automatiquement membres d'UEA (Association Universelle). Ils reçoivent les revues *Kontakto* et *TEJO tutmonde*. Les membres de moins de 30 ans reçoivent le *Jarlibro* (l'annuaire des associations et délégués du monde entier).

☛ *JeunEsperanto Info* est bilingue. Les autres publications sont en espéranto.

☛ Les associations et entreprises peuvent adhérer à JEFO et entrent dans les mêmes catégories que les plus de 30 ans.

☛ Conformément à la loi Informatique et Libertés du 6 janvier 1978, vous disposez d'un droit d'accès et de rectification pour toute information vous concernant.

Chèque postal, bancaire ou mandat lettre à l'ordre de "Espéranto Jeunes" à joindre OBLIGATOIREMENT avec ce bulletin d'adhésion à :

J.E.F.O.

**4 bis, rue de la Cerisale
 F-75004 PARIS**



↓ Cadres réservés à nos services ↓

--	--	--

Nova ! "Asteriks kaj KLEOPATRA" : 60 FF

la JEF0 butik'

"La Danĝera Lingvo" de Ulrich Lins.
Historio de persekutoj kontraŭ Esperanto.
195FF.

Por JEF0 membroj :
nur 150FF !!

(inter krampoj)
Por JEF0 membroj

La HyperCard stako kiu prezentas Esperanton, por Macintosh komputeroj...



Farita de Cleve Lendon...
Tradukita en la francan de la klubo de Clermont-Ferrand...
Senlime kopiebla.
Ekzistas en la angla kaj en la franca.

Tarifs valables jusqu'au 1er octobre 1995

La eta reĝo (de Markos)	: 40 (20)	x =
IMO (de Markos)	: 38	x =
CERL Logopinglo	: 20 (15)	x =
J.I. (po unu ekde 93/5)	: 20	x =
Disketo HYPERCARD (Fr / An)	: 50	x =
E-Karaktraro por Macintosh	: 50	x =
E-Karaktraro por Windows	: 50	x =
T-ĉemizo Fek' al neŭtralec'	: 50	x =
T-ĉemizo 3615 esperanto	: 60	x =
T-ĉemizo Esperanto	: 70	x =
T-ĉemizo K.E.F.	: 80	x =
Asteriks' Gladiotoro	: 60	x =
Pasporta Servo	: 70 (60)	x =
La Danĝera Lingvo	: 195 (150)	x =
Assimil libro+kasedoj	: 390 (350)	x =
Sendokostoj	:	15

Speciala prezo por JEF0 membroj : 350 FF !

SUMO :

E-Karaktraroj por Macintosh kaj Windows !

Ni kompilis ĉiujn konatajn de ni E-karaktrarojn (bitmap, TrueType, Postscript) por Macintosh kaj Windows.
En la disketo ankaŭ troviĝas ekzemplaj tekstoj el la plej bonaj artikoloj de JeunEsperanto Info ĉijare !
La prezo (50FF) estas por la disketo kaj la tekstoj, ne la karaktraroj, inter kiuj kelkaj estas libere kopieblaj, aliaj kondiĉe. Se vi posedas aliajn karaktrarojn, ni plezure aldonos ilin en tiun kompilaĵon.

La célèbre méthode Assimil "Esperanto sen peno" en coffret complet, c'est le livre... et les cassettes pour apprendre en voiture, ou pendant son jogging...

Ne forgesu kunmeti ĉekon, kaj skribi vian adreson... aliflanke de ĉi-paĝo !

**Komparu
niajn
prezojn...**

...kun aliĉies !

Nous avons tiré une nouvelle série du t-shirt "3615 ESPERANTO OU TARD" d'une qualité de 150g, les tailles disponibles sont M, L ou XL.
Prix inchangé : 60FF.
A partir de 5 : 55FF.
A partir de 10 : 50FF.

Nouvelle série !!

Vi dezirus ke JEF0 peru kaj disvendu vian produkton ? Ni atente pritraktos ĉiujn viajn proponojn.

LIBROJ

L'an dernier, *SAT-amikaro* annonçait que le *Courrier de l'Environnement* (numéro 23), un des bulletins de l'*Institut National de Recherche en Agronomie*, faisait paraître un résumé en espéranto. Vraisemblablement, le but de ce journal était plutôt de faire un résumé dans une langue différente pour chaque numéro.

Dans la *Chronique d'Amnesty* de février 95, page 29, Jacqueline Lépeix consacre une demi-page à l'activité du groupe 89 d'Amnesty International. Extrait : "(...) On envoie une photocopie à l'équipe «peine de mort» à Paris, ils trouveront sûrement un traducteur d'estonien. Eh ben non, à la Pierre-Levée, ils ne trouvent pas ! Tous les groupes français ayant travaillé sur l'Estonie ont reçu la même lettre de *Pro Patria*, mais personne n'a rien compris. Arrivent les vacances d'été. Je pars pour l'Espagne, participer à un congrès d'espéranto. A tout hasard, je prends avec moi la lettre de *Pro Patria*. Après le congrès, je participe, toujours en espéranto (et en autocar), à un circuit touristique en Andalousie. On est une quarantaine et, dans le groupe, il y a... un estonien ! (...) j'apprends

FAMULOJ

Le nouveau disque de Michael Jackson, *HISTORY* est paru le 14 juin. Le dernier numéro de *Black&White*, le bulletin de son fan-club, ne fait plus aucune allusion à l'espéranto, contrairement au numéro précédent. Nous avons posé la question à la rédaction : il nous a été répondu qu'aucune nouvelle information n'était arrivée à ce sujet. De même, le fameux clip présentant Michael sous forme de statue semble ne comporter aucun propos en espéranto.

Pourtant dans le journal *Eventoj* (1/junio), la jeune allemande Diana Soest affirme avoir vu le clip le 25 juin sur MTV-satellite, commencer par les mots : "diversaj nacioj de la mondo konstruas ĉi tiun skulptaĵon en la nomo de tutmonda patrineco kaj amo kaj la kuraca forto de muziko". Alors, quelqu'un en France a-t-il vu cette version ?



Le
n° 1814
de **Télé**
7 jours
du 4
mars 95

ESPERANTO EN MALESPERANTIO

En direct de malesperantie

Notre principale source d'informations, le Minitel, a subi quelques mésaventures avec la disparition soudaine du 3614 PING début juillet. Heureusement, les jours de **Esperanto en Malesperantio** ne sont pas en danger, d'abord parce que vous êtes de plus en plus nombreux à nous écrire pour nous envoyer des coupures de presse, ensuite parce que la faune trinitétique, réactive et nomade par nature, a immédiatement déménagé sur un autre service : le 3614 CNX. Aussi simple d'utilisation que le Minicom de France Télécom (sans en avoir l'outrance tarifaire), il permet de nouvelles utilisations intéressantes comme le dialogue direct à plusieurs.

Si vous voyez de l'espéranto à la télé, dans la presse ou dans la rue, vous pouvez nous prévenir immédiatement par Minitel, même sans y avoir de boîte aux lettres. Vous me joindrez directement en composant 3614 CNX JEFO78 et en tapant le texte de votre message. N'oubliez pas de signer, à moins que vous soyez ponté(e) sur l'anonymat. Si vous ne possédez pas de Minitel, vous pouvez nous envoyer les coupures, en n'oubliant pas de joindre les références et votre nom ♦

enfin que le parti Pro Patria nous assure de sa solidarité dans le combat que nous menons pour l'abolition de la peine de mort en Estonie. Après tout, l'Estonie, ça n'est pas si loin que ça de chez Zamenhof !" (informas Jacqueline Lépeix).

présente l'autobiographie de la patineuse **Surya Bonaly** : "L'Enfant du Soleil". Surya y explique comment elle et sa mère se comprennent en secret : "Pour pouvoir communiquer, même pendant les heures de cours, nous mettons au point un code connu de nous seules, fait de gestes, de syllabes esquissées du bout des lèvres et de termes empruntés aux autres disciplines sportives que je pratique. Au début, mes parents avaient même pensé à utiliser un casque émetteur-récepteur. Ou à me parler en espéranto" (informas Manjo Clopeau).

Dans *PC Magazine* hors série On-Line, page 73, un article traite des services *Web* sur l'Internet : "Espéranto : Si le Basic vous semble trivial, le Pascal obsolète et Smalltalk trop répandu, branchez-vous sur soc.culture.esperanto, un forum pour les spécialistes de la première langue universelle, parlée par au moins quelques centaines de personnes dans le monde. ☛

☛ Petit détail, ce forum est entièrement en espéranto. Courage" (*MICHEL95). Basic, Pascal et Smalltalk sont des langages de programmation.

Dans le numéro 2 de **Interactif**, un article de Pascal Forneri s'intitule "l'espéranto sera Cyber". Il ne fait pas allusion à notre langue, mais à l'anglais spécifique aux utilisateurs de l'Internet (*JAKA).

Le **Journal des Enfants** de la fin du mois de mai a annoncé l'émission sur Canal J, en l'introduisant par "et si tout les habitants de la terre parlaient la même langue ! Une langue de plus facile à apprendre et avec peu de grammaire", phrase

Zamenhof, en 1887. Les mots sont formés sur des racines auxquelles

on ajoute une ou plusieurs lettres. Par exemple, *parolo* = parole, *paroloj* = paroles. Il

existe de nombreuses publications, des émissions de radio et de télé en espéranto" (*CLAIR).

Le **Monde** des 2 et 3 juillet rapporte les propos de Jacques Santer,



RADIO

Radio France International qui émettait en espéranto jusqu'aux années 50, se désintéresse aujourd'hui de notre langue. Pourtant Nicolas, espérantiste, y travaille, c'est pourquoi de temps en temps on peut y entendre un C.D. de *Kajto* (*TONI).

Radio Sarajevo diffuse depuis le 4 août 1994 un programme hebdomadaire en espéranto dans la nuit du mercredi au jeudi, à partir de 0 h 15, sur 612 kHz (490 m) et 7105 kHz (42,2 m) (*ESPER06) ◆

te dans le programme de vols spaciaux conjoints mis au point depuis 1992 par les américains et les russes. Conséquences indirectes : la durée des négociations et des conférences de presse a doublé, le temps pour les interprètes de faire leur travail de traduction.

L'équipage de la navette Atlantis [...] a appris le russe pour communiquer avec les cosmonautes de la station Mir qu'ils doivent retrouver dans l'espace jeudi prochain. Mais hormis l'astronaute

Bonie Dunbar qui a passé un an à Moscou pour préparer ce vol, aucun passager américain d'Atlantis n'est à l'aise en russe.

Pour les deux russes [...], c'est l'anglais qui pose des difficultés. [...] américains et russes sont surtout soucieux d'un éventuel cas d'urgence qui ne

lais-



serait pas de place à l'hésitation et à la traduction.

Ĉiu esperantisto, kiu sendos al TAKE unupaĝan artikolon (A4) pri sia profesio (ne-instruista !) dum 1995 ricevos donace unujaran abonon al TAKE - LA DOMO.

TAKE
RN 83 - rue de Tiefenbach
F-68920 Wintzenheim
Tel : 89 80 11 17
Fax : 89 79 43 33

soufflée par Antoine, qui a suscité l'émission (*VILNIUS).

Le numéro de juin de **Science Illustrée** a publié le courrier d'un certain Laurent Vignaud sur l'espéranto.

Dans le courrier des lecteurs des **Clés de l'Actualité - Junior** du 1^{er} au 7 juin : "Bonjour, je m'appelle Toufiq, j'ai 10 ans, j'habite Fécamp. Existe-t-il une langue universelle ? Les Clés Junior : oui, plusieurs langues universelles ont été inventées. La plus connue est l'espéranto, créée par un polonais Louis Lazare

président de la Commission européenne, dans l'émission les grands entretiens RFI - Le Monde du vendredi 30 juin, sur la monnaie unique : "Le citoyen doit pouvoir s'identifier à sa monnaie. Il ne faut pas d'une monnaie espéranto".


Dans **La Montagne** du 26/6/95.

La coopération spaciale a vu fleurir 2 professions dans les centres spaciaux, interprète et professeur de langue. [...] La barrière de langues est omniprésen-

(...) Pour le directeur de vol Bob Castle, la traduction ne sera pas seulement entre l'anglais et le russe mais consistera à <passer du jargon de la NASA à l'anglais puis de l'anglais au russe puis du russe au jargon spacial russe>. (*CLAIR) ♦

POLITIKO

Une délégation de 8 espérantistes (dont Laurent de JEFO) a été reçue le 19



avril
à

l'Assemblée

Nationale par trois membres du P.C.F. (Parti Communiste Français), dont le député **Georges Hages** (*JEFO49 et *ESP-93). Le PCF pourrait écrire une proposition de loi en faveur de l'espéranto, avec l'aide des espérantistes. Pour ceux parmi nos lecteurs qui sont peu au fait des pratiques politiques de notre pays, il faut savoir qu'une proposition de loi n'a aucune chance d'être votée. Néanmoins, la démarche n'est pas entièrement inutile. Le premier groupe à utiliser l'espéranto à l'Assemblée Européenne sera-t-il le groupe communiste ?

La réponse d'Antoine Waechter à une lettre personnelle d'Éric Benech avant les présidentielles : "Cher Monsieur, Nous avons intégré dans notre projet l'inscription de l'espéranto comme langue en option dans les lycées et au baccalauréat. Un éminent espérantiste, Auguste Huberdeau, est membre de notre conseil national. C'est dire que nous ne sommes pas insensibles à vos propositions. Veuillez agréer, etc." (*ESPER06).

Aux élections suivantes pour les municipales, le même Éric Benech et sa tendre amie étaient sur la **liste écologiste pour la ville de Nice**, avec la mention *espérantiste* à côté de leurs noms (*PASSERELLE).

La femme de **Jacques Lang** est contre l'espéranto, bien que son cousin soit espérantiste. Celle de **Waechter** a été convaincue avant lui (*JORGOS).

Le 23 mai, plusieurs radios allemandes ont rapporté les


TELEVIDEO

Le 5 juin, dans **Nulle Part Ailleurs**, sur Canal +, le nom commun *espéranto* a été utilisé plusieurs fois pour désigner les expressions propres aux utilisateurs de l'Internet (*VORTARO).

Le lendemain sur la même chaîne, l'émission **l'Œil du cyclone** a mentionné l'espéranto quelques secondes, montrant les enfants d'une famille d'espérantistes anglais parler l'espéranto, ainsi que quelques photos de livres et de Ludoviko.

Début juin, la chaîne câblée **Canal J** a diffusé une émission de 10 minutes sur l'espéranto, grâce au travail d'Antoine qui travaille dans une société de production. Il nous rapporte ses impressions du tournage du 27 avril : "Reçus à Grésillon avec beaucoup de chaleur... Rencontres avec les petits Croates, avec leur professeur, avec les 36 petits espérantistes et toute l'équipe d'accueil du château. Activités, spectacle des enfants, visite d'un château... avec l'aide de Pierre Bouvier et de sa fille Présence, qui est le personnage central du reportage". En tout 1H40 de bobine qui donneront 4 minutes de reportage à l'antenne.

Dans la suite de l'émission, Michel Audibert a répondu en studio aux questions des enfants. Cette émission, extrêmement positive pour notre langue, a été diffusée trois fois. La cassette a été offerte à UFE et SAT. Il est possible que cette émission soit rediffusée par TV5, la chaîne satellite francophone, dont l'audience est infiniment supérieure à celle de Canal J (*VILNIUS) ♦



propos du **chancelier Kohl** «Nous ne voulons pas d'une Europe espéranto...». L'agence de presse allemande DPA a délivré trois dépêches mentionnant cette phrase.

Le jour suivant, les journaux *Franfurter Rundschau*, *Handelsblatt*, *Stuttgarter Zeitung*, *Rheinpfalz*, *Berliner Morgenpost* et *Hamburger Abendblatt*, ont repris le communiqué. Le *Berliner Zeitung* a même titré l'article "Helmut Kohl: Wir wollen kein Esperanto-Europa". Le 25 mai, Franck Stocker faxait à DPA un communiqué de *Germana Esperanto Asocio*, qui est paru le lendemain dans plusieurs journaux dont *Frankfurter Allgemeine*, *Stuttgarter Zeitung* et *Tageszeitung*. Le 31 mai, le *Frankfurter Rundschau* publiait dans le courrier des lecteurs une lettre d'Ulrich Mathias et le *Berliner Zeitung* a promis de faire de même.

Le chancelier Kohl n'a pas donné suite, mais il a déjà exprimé dans le passé des opinions très défavorables à l'espéranto (informas Ulrich Mathias, gazetara arkivo de GEA, pere de Internet).

(...) Pour le directeur de vol Bob Castle, la traduction ne sera pas seulement entre l'anglais et le

russe mais consistera à < passer du jargon de la NASA à l'anglais puis de l'anglais au russe puis du russe au jargon spacial russe >. (*CLAIR)...)



DANKON

Koran dankon al niaj legantoj kaj al E-minitelistoj : Eric Benech (*ESPER06), Vincent Charlot (*ESP-93), Georges Comte (*JORGOS), Jean-Pierre Danvy (*VORTARO), Christophe Féré (*JAKA), Nicolas M. (*TONI), Clair Mahé (*CLAIR), Michel Slagmulder (*MICHEL95), Jean-Pierre Travers (*PASSERELLE), Laurent Vignaud (*JEFO49), Antoine Vonnet (*VILNIUS) et votre serviteur (*JEFO78).

16

FRANCA IBERIA KONFERENCO DE LA ESPERANTO-JUNULARO



politikaj ŝanĝoj en Eŭropo dum la lastaj jaroj influas ankaŭ la situacion de la eŭropa Esperanto-movado. Ne nur la orientaj, sed ankaŭ multaj okcidentaj asocioj estas portataj kune kun siaj problemoj sur la ondoj de evoluo — jen prosperas, jen stagnas, jen disfalas...

Por pridiskuti aktualajn temojn kaj siajn agadoplanojn Ĉeĥa E-Junularo kaj Germana E-Junularo okazigis komence de 1991 Mez-Eŭropan Junularan Konferencon (MEJK) kun la celo reagi al la ŝanĝita situacio en tiu regiono kaj per tia forumo ebligi stabilan kunlaboron.

Gravaj atingajoj de MEJK estas i.a. organizado de Mez-Eŭropa Junulara Semajno (MEJS) en Olomouc/Ĉeĥio (1992), Triberg/Germanio (1994) kaj Tata/Hungario (1995) kaj la komunaj someraj kursoj en Prago.

La rezultoj montris la fruktodonon de tia kunlaboro, kaj pri la koncepto de similaj konferencoj ekinteresiĝis pli kaj pli da landaj sekcioj. Estis starigataj Balkana Esperanto-Konferenco (BaJK), Okcident-Eŭropa Konferenco de la Esperanto-Junularoj (OKEJ), kaj Junulara Alp-Adria konferenco (JAAK).

Nun tiu koncepto atingis ankaŭ SudOkcidentan Eŭropon, regiono

tradicie sufiĉe izolita pro sia malproksimeco al la ĝisnunaj plej aktivaj regionoj de Eŭropo kaj, aldone, pro la financaj malfacilaĵoj pagi tiel longajn vojaĝojn.

Nur la baza koncepto de la jam menciitaj konferencoj naskis ideon pri la unua FIKEJ (Franca Iberia Konferenco de la Esperanto-Junularoj). Ĝi tamen malsimilas de la aliaj en kelkaj aspektoj: ĝi ja ne estos konferenco nur de landaj sekcioj, sed ankaŭ de lokaj asocioj kaj unuopuloj, kiuj deziras kaj, kompreneble, havos ion por alporti al la konferenco.

La konferenco, okazonta en Rocafort (apud Valencio) de la 12-a ĝis 15-a de oktobro 1995, estas organizata de Valenciana Esperanto-Junularo kaj de Eŭropa Junulara Esperanto-Oficejo. Invititaj estas JEFO (precipe suda Francio), Portugala EJ, Kataluna EJ, Eŭska EJ, Sevilla EJ kaj aktivuloj el Madrido kaj Galegio. Pro proksimeco, la konferenco volas atingi ankaŭ landojn el Norda Afriko kaj klopodi tiel plifortigi kontaktojn inter Eŭropo kaj Afriko ene de la Esperanta movado.

La antaŭvidata programpropono de FIKEJ konsistos pli malpli el la jenaj punktoj:

- raporto pri ĝisnuna agado, stato kaj estontaj planoj

- speciala analizo de varbado kaj instruado

- starigo de daŭra interŝanĝo de informoj kaj spertoj

- komunaj aranĝoj

Se vi apartenas al la celataj regionoj aŭ ne estis mem invitita de la organizantoj sed pensas ke via ĉeesto povas alporti ion al la konferenco skribu, klarigante viajn kialojn, kaj ni sendos al vi informojn ♦


Kontaktadreso:

Miquel Gómez i Besòs
Eŭropa Junulara Esperanto-Oficejo
Rheinweg 15
53113 Bonn

tel: +49 228 235898

faks: +49 228 232764

retpoŝto: tejo_oficejo@bn.maus.de



La lettre du président


17



L'ordinateur à peine éteint après avoir rédigé le "protocole" des réunions du komitato de TEJO qui ont eu lieu à Saint Petersburg pendant le 5^{ème} IJK qui vient de se terminer, je reprends la plume pour vous donner quelques nouvelles.

Un mot à propos de l'IJK : plus de 300 jeunes de 40 pays se sont retrouvés dans la bonne humeur au bord de la mer Baltique, avec parmi eux 11 Français ! Et pas seulement des routiniers des congrès espérantophones mais également de nouvelles têtes. Un bon point pour l'avenir et le renouvellement de JEFO.

Second bon point, les idées qui ont vu le jour et qui promettent une année animée pour l'association : à l'occasion du congrès 1996 d'AFE qui aura lieu à Lyon du 16 au 19 mai, JEFO proposera en même temps et au même endroit un "junulara programo" et invite les jeunes de tous les pays qui le souhaitent -



en particulier les pays voisins car 4 jours c'est court pour un long voyage - à venir pour une rencontre franco-anglo-belgo-hollando-germano-helvetico-italo-espagnole...

Un évènement à ne pas manquer !

Je vous invite dès à présent à vous manifester pour donner vos idées, suggestions, conseils... et proposer votre aide à l'organisation de cette rencontre.

L'assemblée générale 1996 de JEFO aura lieu à cette occasion, le 16 mai au matin à Lyon. Pour ce qui est de celle de 1995 - obligatoire - elle aura lieu à nouveau en décembre, au siège et sera une bonne occasion de faire avancer la rencontre de mai 96.

Autre nouvelle : une quinzaine de jeunes Russes viendront probablement en France

pendant une semaine, après l'IS... Nous

devrons donc planifier leur séjour en France et... prévoir

leur hébergement pour dormir entre

chaque étape de leur visite .

Plus d'infos dans le prochain JeanEspéranto INFO et dès que possible sur le minitel pour les connectés.

Enfin, je profite de cette tribune pour féliciter et remercier

Taka au nom de tous les lecteurs du JI

TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj) kaj JEFO lanĉas konkurson. Ni petas ĉiujn vi streĉe cerbumi pri la jena temo :

Kiel varbi junajn esperanto-parolantojn en altlernejoj (literaturaj, sciencaj kaj teknikaj) kaj en entreprenoj.

Ĉiuj ideoj bonvenos, ĉefe se akompanos ilin taksado de fareblecoj laŭ homaj kaj monaj rimedoj.

Gajnantoj rajtos partopreni en semajnfina sesio en Elzaco kun reprezentantoj de aliaj junularaj E-organizo, parte de viaj **elspezaj pagitaj de TAKE**.

Viajn proponojn sendu al JEFO antaŭ la 1a de oktobro 1995.


pour son travail de coordination, de collecte des articles et de mise en page de la revue que vous avez entre les mains.

Christophe souhaite en effet nous abandonner pour aller habiter sur une île ensoleillée... Bonne chance et à bientôt!

En attendant le prochain JeanEspéranto INFO, n'hésitez pas à nous écrire.

Bonne reprise du travail ou des études à tous!

Bruno



Kultura Esperanto-Festivalo

Sekretariejo
p/a Jacob Nordfalk
Radmandsgade 53, 2. th.
2200 KØBENHAGØ N
Telefono : + 45 31 83 82 20
E-poŝto : nordfalk@fys.ku.dk

Per la jena inviteleto de la KEF-grupo, artistoj estas invitataj proponi sin mem kaj sian prezentadon kaj ordinaruloj proponi

artisto(j)n por la festivalo.

La preparoj por la venonta Kultura Esperanto-Festivalo jam komenciĝis, kaj sendube ĝi estos almenaŭ tiel bonega kiel la kvara (legu eventuale la recenzojn en Rok-Gazet', Koncize kaj Kvinpinto). Ĝi okazos de la 6a ĝis la 11a de aŭgusto 1996, kiam Kopenhago estos la eŭropa kultururbo. Do, jam nun notu la daton en vian kalendaron. Tiuj, kiuj jam partoprenis

en KEF, scias, ke estos neforgeseblaj tagoj, plenaj je diversaj eroj je la internacia, diaspora kulturo, plenaj je bonhumoraj esperanto-parolantoj el multaj landoj, plenaj je spertoj, plenaj je eksterordinara etoso.

Kiel nova inventaĵo estos la eblo por aktiva festivalumado, la eblo por esti kreema, ĉar kulturo ne nur estas io, kiun kreas pli malpli frenezaj homoj,

Kiel per dek lertaĵoj ĉarmi virinon ?

1 - Unue evitu esti plej bele vestita : ŝi ne komprenos, la tagon, kiam vi ne plu estos tia. Prefereble estu senzorge vestita sed neta !

2 - Sportumu, almenaŭ je ŝiaj okuloj (kiam vi invitas ŝin en via loĝejo, faru tiamaniere, ke ŝi ekvidos vian sporto-sakon, kiu devas esti ne nova).

3 - Via hejmo devas estis plej bone ordigita, eĉ se tion vi devas farigi al purigistino (neniam farigu tion al via patrino... demandoj... pliaj demandoj...).

4 - Amu la bestojn (evitu la zoologiajn ĝardenojn) ; kial ne havi kelkajn viahejme ? Sed ĉar, kiam oni amas la bestojn, oni devas kapabli doni al ili la tutan feliĉon, kiun ili meritas, kaj nun, vi tion ne povas fari !

5 - Laŭ ŝia socia origino, ŝia lingvaĵo estos malsimila, kaj por adopti similan lingvaĵon, necesas ŝin aŭskulti, fari demandojn, nepre ne respondi la siajn por plikreskigi ŝian scivolemon, kiu ĉiukaze ĉiam estas nesatigebla, sed ne ĉiam por la sama homo.

6 - Estu imagoplena, ofte ŝanĝu la distrojn, la babil-temon (des pli, se ĝi ofte pritemas vin).

7 - Ne montru al ŝi, ke vi estas tre proksima al viaj amik(in)oj, ĉar ŝi pensos, ke por vi pli gravas viaj amik(in)oj ol via edzino (eĉ se tio

estas la kazo, kaj precipe se tio estas la kazo).

8 - Estu help-preta, t.e. akompanu ŝian patrinon al stacidomo (nepre ne forgesi tiajn forirojn), aŭ



akompanu ŝin al spektaklo, kiu malplaĉas al vi, sed al kiu vi direktos certan intereson, sed ne troigu, por poste ne esti devigata denove viziti tian spektaklon).

9 - Nepre evitu aludi vian eventualan (tamen ne nepre neeviteblan) seksan rilaton, lasu al ŝi iniciati tion, kaj nepre ne lasu ie ajn videblaj viajn kondomojn (kiujn vi nepre devos uzi, eĉ kun ŝi).

10 - Finfine, estu ĉarma kaj por tio petu konsilojn al eksterlandaninoj : ili ĉiuj diras, ke la Francoj estas elstaraj ĉarmuloj, aŭ demandu mian edzinon !

Venontfoje : kiel ĉarmi viron !

JAKA

19

☛ kaj kiun NI, la ordinaraĵoj, la mense sanaj, rigardas en muzeoj, spektas en teatro aŭ aŭskultas en koncerto. Je la nuna stato, tio signifas, ke ni planas rezultorientitajn laborgrupojn, ekz-e korusa(j)n verkaĵo(j)n kaj permane farota(j)n artaĵo(j)n, sed se ekestos en aktivaj cerboj dise en la mondo aliaj ideoj, ne hiezitu proponi tiujn. Cetere a n k a ŭ



ideoj, en kiuj la procezo ludas la ĉefan rolon, estas bonvenaj.

La KEF-arangantoj tial serĉas kontaktojn kun ĉiaj artistoj, ĉu muzikistoj, pentristoj, komponistoj, verkistoj, komediantoj, skulpturistoj aŭ aliaj, kiuj pretas aktivi/aktori dum la festivalo. Ne forgesu, ke akcepteblas nur originale esperantaj verkaĵoj, kaj kion povos vi, vi la artisto, prezenti ? Ankaŭ proponoj de/pri ekstereŭropaj artistoj bonvenas. Bonvolu sciigi nin, ĉu vi pretas (parte) gvidi la aktivigon de la partoprenantaro.

1996 ne nur estas KEF'a jaro. Ĝi ankaŭ estas jubilea jaro, kiun la esperantio iel

devus marki. Temas kompreneble pri la esperanta teatro, kies unua prezentaĵo okazis ĝuste antaŭ 100 jaroj en la urbo Smolensk, Pollando. Estis verko de la rusa nobelulo Tolstoj, kiu estis tre favora al la internacia lingvo. Pripensu tion !

Se vi tute ne emas aktiviĝi kulture, vi tamen notu la daton, ĉar kompreneble eblos flegi la pli pasivan partoprenon. Laŭsperte ne ĉiuj opinias tiun aktivigon kulturalan, tiun memtorturadon, homa, kaj por tiuj hedonismuloj ankaŭ estu loko.

Amike salutas ◆

La KEF-arangantoj / JSM



Meti-lernanto (en la unua jaro), lernas la lignaĵistan metion. Li serĉas korespondanto(j)n, (prefereble lignaĵistojn) en Francio, Germanio aŭ Hispanio, k.t.p.

Kvankam ne riĉa, li "pretas gastigi ĉiujn TEJOsamideanojn, se ili deziras viziti Togolandon. Ili povas dormi liahejme, kaj promeni kun li pro malkovri la landon aŭ urbon".

Skribu al li :S-ro KPODAR K.

Djifa

s/c KPODAR Messanvi

BP 324


LOME TOGO



Le saviez-vous



Il existe des feuillets touristiques en espéranto pour les châteaux d'Amboise, Chenonceaux, Blois, Chambord, ... ainsi qu'une vingtaine de sites touristiques dans les départements 37, 41, 44, 49 !



La ludo "TRIACTION"

Kio estas la ludo "TRIACTION"?

"TRIACTION" estas altkvalita ludo por lerni aŭ relerni lingvojn. Ĝi enhavas tri diversajn ludojn: mimi, desegni kaj diveni. En des pli da lingvojn oni sukcesas traduki la serĉitan vorton ju pli da poentoj oni ricevas. Samtempe ludeblas en la sekvantaj lingvoj: franca, itala, germana, angla, hispana, portugala. La ludo estis provata dum la lasta IS en Tübingen kaj ĝi vere furoris.

Kial do ni parolas pri tio?

La firmao PROLANG, kiu eldonas tiun ludon estas preta aldoni Esperanton al la jam ekzistantaj lingvoj. Tio estos bonega varbilo por nia lingvo.

Sed antaŭ fari tion, ĝi volas finvendi la nunan stokon (do de ankoraŭ neesperantigita ludo) kiu konsistas proksimume el mil ekzempleroj. Por plirapidigi la eldonon




de la versio kun Esperanto kaj plibonigi la financon staton de la Esperanto-asocioj, esperantistoj povas helpi al la vendado.

La ludo kostas 390 FRF kaj ĉiu Esperanto-asocio, kiu sukcesas vendi la ludon, rajtas ricevi po 40 FRF por ĉiu vendita ekzemplero. Ankaŭ ni bezonos perantojn por vendi la esperantigitan version de la ludo, kiam ĝi aperos.

Por pli da informoj :

Firmao PROLANG
12, Allée de la Desiree
F-13009 MARSEILLE
FRANCIO
Tel: (+33) 91 82 10 01
Fax: (+33) 91 26 69 70



Bezonatas . . .
Mankas . . .
Petatas . . .
Serĉatas . . .

Baldaŭ alvenos la nova lerneja jaro, kaj ankaŭ baldaŭ la JEFO-bulteno bezonos novan redaktoron. Jen do plia tasko plenumenda en JEFO. Ĉu vi ŝatus iĝi redaktoro de JeunEspéranto-INFO ? Ĉu vi konas iun, kiu interesiĝus pri tiu tasko ?

En kio ĝi konsistas ? La laboro estas ĉefe kolekti diversajn tekstojn kaj desegnojn, kaj ilin ordigi por fari JeunEspéranto-INFO.

La ĉefa ilo bezonata por tia laboro estas posedi komputilon. Fari la gazeton sen komputilo ja eblus, sed la laboro de la redaktisto estas multoble plifaciligita dank'al ĝi : rapideco, kvalito de la rezulto,...

Kiel procedas la redaktisto (aŭ redaktistino !) ?

UNUE

La redaktisto devas elekti kaj ofte peti la artikolojn, kiuj aperos en la bulteno. Ili ja devas ekzemple ne pritrakti la saman temon. Kaj kompreneble, ili estu sufiĉe interesaj por plej granda publiko (ne nur por la junuloj aŭ por la e-parolantoj, sed ankaŭ por aliaj legontoj), ĉar la bultenon legas ne nur la junaj JEFO-anoj, sed ankaŭ aliaj, al kiuj ni reklame ĝin sendas, ktp...

Elekto de artikoloj nun estas faciligita dank'al la jam farita laboro de la nuna redaktoro Jaka. De post pluraj numeroj, li kreis diversajn regulajn rubrikojn, kiuj aperas ĉiunumere : Kalendaro, 3615 ESPERANTO, Gazetaro, Le saviez-vous ?, Demandoj viaj, ... Por tiuj rubrikoj skribas regulaj artikolantoj (sufiĉas kelkfoje rememorigi al ili, ke ili sendu siajn kontribuojn !).

Restas do kelkaj liberaj paĝoj, kiujn necesas plenigi per aktualaĵoj (raportoj pri kongresoj, ...), ĝeneralaj informoj, diversaj temoj, ...

Kiam li ricevas deziratajn tekstojn, dua tasko estas "purigi" ilin. Tio signifas, ke ofte la ricevataj tekstoj estas tajpitaj per diversaj komputil-programoj (per PC aŭ Macintosh, aŭ eĉ aliaj), kaj la transkodigo de la literoj inter la komputiloj kelkfoje misfunkcias. Tio validas precipe pri la supersignitaj esperanto-literoj, kiujn 5 artikolantoj eble skribos per 5 malsamaj manieroj !! Do, post ricevo de la surdisketaj tekstoj, la redaktoro devas ŝanĝi ĉiujn "cx", "c", "ch", "c'", ... en "ĉ" !

Tria ĉefa tasko de la redaktisto estas enpaĝigo de la tekstoj. (Al tio tre utilas komputilo). La bulteno estu kiel eble plej alloga, do, ĝi konsistu ne nur el sinsekvo da tekstoj sen iu ajn desegno. La paĝoj estu divers- kaj bel-aspektaj. Laŭbezone, la redaktisto aldonas fotojn aŭ desegnojn (aŭ mendas ilin), ... Tiu parto de la laboro de la redaktoro estas tiu, kiu lasas al li plej multe da libereco : kiom da redaktistoj, tiom da divers-aspektaj enpaĝigoj. Ja la nunan aspekton de la revuo povos ŝanĝi la estonta redaktoro (por ĝin plibeligi, kompreneble !).

Same kiel pri la elekto de artikoloj, la enpaĝiga tasko nun estas faciligita dank'al la jam kreitaj rubrikoj : nun la laboro ne plu konsistas en tuta arango de gazeto, sed en plenigo de rubrikoj kaj de kelkaj malplenaj paĝoj.

FINE

Ekzistas kvara tasko, sed ĝin faras ne nepre (kaj ne ofte) la redaktisto : tio estas la kontrolo/korektado de la ĵus farita laboro. Ja post la fino de la enpaĝigo, ofte necesas korekti la ĵus aranĝitajn paĝojn. Se la redaktisto bonege scipovas Esperanton, des pli facila estos la korektado. Kiel ĝi okazas ? La redaktisto printas malnetojn de la diversaj paĝoj korektendaj, kaj sendas ilin al almenaŭ 2 homoj, kiuj korektos kaj la lingvajn kaj la enpaĝigajn misojn, ... Post korektado, la redaktisto ricevas la malnetojn, komputile korektas la originalon, kaj finfininte la laboron, sendas la tuton al la presisto (aŭ fotokopionto).

Povas esti, ke 2 aŭ 3 korektantoj sinsekve kontrolas la malneton.

Do, resume, la tasko ne estas tiel malfacila. Sufiĉas esti iomete organizata, decidi kun la artikolantoj pri limdatoj por la sendo de kontribuoj, ... Jen ĉio tio, kio konsistigas la laboron de la redaktisto de JeunEspéranto-INFO.

Do eble nun, ĵus leginte la ĉi-suprajn liniojn (espereble bonajn klarigojn), vi havas konkretajn proponojn por plifaciligi tiun redaktan laboron, por ŝpari tempon, por plibeligi la revuon... Viajn ideojn, viajn helponojn ni atendas, kaj samtempe ankaŭ... la rimedojn por ilin fari !

Kion ricevas la redaktoro, kompanse pro lia laboro ? La salajra sumo enhavas multajn nulojn, kaj eĉ nur nulojn. Ĉu la posteno estas danĝera ? Tute ne. Nur kelkfoje la redaktisto ricevas kritikojn, pro miso en la enpaĝigo, pro malrapida laboro, ktp..., ("kritiki estas facile, fari malfacile" diris Zamenhof), sed feliĉe, li ofte ricevas laŭdojn pro la revua belaspekto, ...

Do, ĉu vi nun sentas vin preta al redaktorumado ? Aŭ preta por kunhelpi estontan redaktoron ? JEFO, VIA asocio, atendas ĉiujn viajn proponojn kaj ideojn. Ja la bulteno nun estas la plej grava ligilo inter ĉiuj JEFO-membroj, kaj ĝi bezonas kunlaboron de vi ĉiuj ◆

La redakcio



KIUJ

ESTAS ILI ?

Nomo : LOISON

Antaŭnomo : Didier

Naskiĝdato kaj loko : 27/03/73 Auxerre (89)

Okul-koloro : Brunaj-verdaj

Statur : 1m87

Profesio : Studento

Esperanto :

Li unuafoje aŭdis pri E-o dank'al Brigitte Vincent meze de aŭgusto 1988.

Li kontaktis SAT-Amikaron, kies sekretario persone manskribis kunsendante multajn diversajn franclingvajn dokumentojn.

Dume li recevis de UFE broŝuron kaj lernilmendilon (kun pli altaj prezoj) sen la plia vorto.

Li sole eklernis per la nova kaj racia kurso de SAT-A.

Li ekrenkontis esperantistojn en 1991 ekstudante en Dijon.

Li partoprenis en 3 IS, 1 IJK, reprezentis JEFO en MEJK, kunfondis universitatan klubon en Dijon (CUBE).

Private :

Li studas pri administrado ekonomia kaj socia (AES), ĉijare en majstrecio pri loka administrado.

Ŝatokupoj :

Esperanto kompreneble. Tempon rabas esplorado pri manieroj elspezi subvenciojn de l'universitato (pli altajn ol petite), prefere profite al JEFO kaj E-O.

Li eklernis la rusan, reveninte de l'bulgara IJK. Estas okazo sperti facilecojn por lerni post esperanto.

Li kolektas poŝt-markojn kaj kartojn, monerojn.

Liaj drogoj estas radio, televido kaj babilado.

Li ŝatas migradi tra naturo kaj montaro.

Lia opinioj pri E-O :

Li ekŝatis ĝin pro ĝiaj logikeco kaj riĉeco. Li ofte vane serĉas vortojn en la franca, kiuj ne ekzistas !

Poste li malkovris ke ĝi estas justa alternativo al subpremo de nacia lingvo al aliaj. Konscia ke ni ne povas nek bezonas konvinki la tutan mondon, li celas agadi tiel, ke ĝin ekkonu ĉiuj homoj kiuj ĝin bezonus kaj ĝuos.

Lia opinio pri JEFO :

Ĝi estas ekzistenda kaj subteninda asocio, ĉar ĉefe ĉe gejunuloj ni devas diskonigi esperanton.

Tion ni faru senprokraste.

Alie ne utilis niaj bonegaj komunikiloj (minitelo kaj JI) !

JAKA

DEMANDOJ VIAJ RESPONDOJ NIAJ



E-O EN GAZETOJ

Mi rimarkis, ke vi pli kaj pli raportas pri mencioj pri E-o tra la gazetaro: ĉu vere la ĵurnalistoj pli interesiĝas pri nia lingvo?

La respondo estas "certe jes". La lingva problemo en la mondo, kaj interalie ene de la Eŭropa Unio (kie egalrajtigi dekon da lingvoj pli kaj pli aperas, kiel utopio) ĉiutage kreskas kaj kaptas la intereson de la ĵurnalistoj, kiuj iom post iom forigas siajn antaŭjuĝojn pri Esperanto.

Tamen, ne nur pro tio aperas pli da "gazetara rubriko" en via bulteno *JeunEspéranto-INFO*. La ĉefa kialo estas, ke Filip' antaŭ kelkaj monatoj prenis sur sin la taskon kolekti ĉiujn tiajn artikolojn pri Esperanto. Tiel, vi konstatis, ke nuntempe multas la artikoloj, favoraj aŭ ne, pri Esperanto.

Kvankam la artikoloj estas sufiĉe freŝaj, ili aperas tro malfrue, por taŭga rebatado. Se rebatind/endan artikolon vi legas en revuo, sendu ĝin plej rapide al Henri Masson (ĉe SAT-Amikaro), kiu de jaroj organizis tre efikan rebatan servon, kaj sendu kopion al ni, ke ni ĝin aperigu en la bultenon.



POR LA PLI JUNAJ ?

Mi gvidas E-kursojn en mezlernejo kaj liceo. La junuloj estas lernemaj, sed kiel fari, por ke poste ili restu en la movado? Kiel JEFO povas helpi min?

Malfacila estas la respondo, kaj JEFO ĝis nun ne trovis iun taŭgan. Same kiel al plenkreskutoj, necesas, ke Esperanto alportu ion konkretan al

individua korespondado. Por ekfunkciigi tion, ofte sufiĉas nur anoncoj en gazetoj (Juna Amiko, Eventoj,...).

Ĝis nun, ne tre konkrete JEFO agas al junuloj. Tamen, ni pretas sendi al vi ekzemplerojn de propagandiloj (la "kiso", la "papago"), sed ankaŭ vi proponu al ni ideojn. Ni volonte publikigos ilin, kaj tiel la revuo vere plenumos sian rolon de en-asocia komunikilo.

Vous nous l'avez demandé

la junuloj. Kio estas konkreta? Jen ekzemploj (listo kompletiginda).

Konkretaĵo povas esti abono al revuo, ne nur al *JeunEspéranto*, sed ekzemple ankaŭ al "Juna Amiko", kiu estas bonega revuo celanta la lernajanojn kaj komencantojn. Revuo regule alvenas en la leterkeston, alportante informojn diversajn, i.a. pri la ekzistanta movado, la renkontigoj.

Alia bona rimedo por interesege la junulojn estas partoprenigi ilin al arango kun samaĝaj eksterlandanoj. Kaj des pli bone estas, se la renkontigo okazas ne en Francio. Tiaj aranĝoj kutimas postlasi al la geknaboj neforgeseblajn memorojn, kaj tio ege instigas ilin denove partopreni.

Pli facila estas grupa korespondado (inter klasoj) aŭ



LITOVA PROVERBO...

...diras: "Ne aĉetu katon en sako". Mi sendis ĉekon al vi por aliĝo al TEJO, kaj ankoraŭ nenion ricevis.

Simpla estas la respondo: paciencon! Same kiel en la antaŭaj jaroj, la UEA-eldonaĵoj aperas sufiĉe malfrue (UEA tre bonvenigus volontulojn por helpi...) kaj al kelkaj novaj membroj, la unuaj ĉi-jaraj gazetoj estis senditaj nur komence de majo.

Ĉu pri TEJO-eldonaĵoj, ĉu pri la JEFO-bulteno..., se vi ne ricevas la atendatajn gazetojn aŭ mendaĵojn, atentigu nin pri tio, kaj ni klopodos ordigi la aferon ♦



**JUNULARA
ESPERANTISTA
FRANCA ORGANIZO**
JeunEspéranto
4 bis, rue de la Cerisaie
75004 PARIS

Direktoro de la eldono
Directeur de la publication :
Bruno FLOCHON (CITRON)
Ĉefredaktoro
Rédacteur en chef :
Christophe FERE (JAKA)

Ilustrantoj
Illustrateurs :
Christophe LEDREUX,
Sébastien DURY

Skizisto
Maquettiste :
Christophe FERE

Redaktora taĉmento
Equipe de rédaction :
L. Vignaud, G. Pirlot,
P. Bérizzi, T. Guyot,
B. Flochon, T. Salomon,
R. Coquard kaj la minitelistoj
de 3615 ESPERANTO...

Tiu ĉi numero kompostatis komputore fine de aŭgusto kaj presatis je 250 ekzempleroj. Por aliĝi al JEFO, plenu kaj sendu nian aliĝilon. Ne forgesu, ke JEFO deĵoras ĉe la sidejo ĉiujn unuajn kaj triajn sabatojn ĉiunonate, ekde la 14a horo (kurso je la 16a).
Sendu viajn artikolojn antaŭ la 15a de oktobropor la kvara numero de 1995.

Ce numéro a été composé fin août et imprimé à 250 exemplaires. Pour adhérer à JEFO, remplissez et envoyez notre bulletin d'adhésion. N'oubliez pas que JEFO se réunit au siège tous les 1^{ers} et 3^{èmes} samedi de chaque mois (cours à 16h00). Envoyez-nous vos articles avant le 15 octobre pour le 4^{ème} numéro de 1995.

Les articles n'engagent que leurs auteurs. Toutefois, JEFO se réserve le droit de les publier ou non.
Tous droits de reproduction autorisés sous réserve d'indication de l'auteur et de la source, et sur simple information à JEFO.

Impimerie: spéciale
Dépôt légal: à parution
ISSN: 1265-3853


3615 *esperanto*
2 couleurs (noir, vert).
par 5 : 55 F, par 10 : 50F

Les t-shirts JEFO

Fek' al neŭtralec'
Noir et blanc.
par 5 : 45 F



60 F



50 F



80 F

Kultura Esperanto Festivalo
4 couleurs (bleu, jaune, rouge, noir).
Fond gris clair. Taille unique XL.
Au dos : dates des festivals depuis 1986.



70 F

Esperanto
(Itala E-o
Junularo)
8 couleurs.

tôt ou tard,
vous les
achèterez.